



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 146, Aprilo 2016**



Novjara Go-konkurso

La 10an de januaro okazis la novjara konkurso en la Go-ludejo de s-ro Sakurai. Bedaŭrinde nur 4 esperantistaj go-ludantoj partoprenis, do s-ro Sakurai invitis aliajn du ne-esperantistojn, kaj ni 6-ope ĝuis la konkurson. La rezulto estis

1a premiito: Anzaŭa (5-dano, ne-esperantisto)

2a premiito: HORI Jasuo (3-dano)

3a premiito: Mori Hitoŝi (5-dano)


La aliaj du esperantistoj estis s-roj Sakurai kaj Kamijama.




Go-partio el novjara kunsido

Partion inter HORI Jasuo kun 2 ŝtonoj kaj MORI Hitosi el la novjara kunsido de JEGA, mi mem analizis. Kun konsilo de s-ro SAKURAI, mi prezentas ĝin. Se vi legantoj trovas eraron aŭ havas alian opinion, bonvole sciigu min pri tio.


MORI Hitoshi mori_kin@nifty.com




Registraĵo 1 : B1-N40



Registraĵo 2 : B41-B75



Registraĵo 3 : N76-N86



Diagramo 1 : Post la rezigno

Registraĵo 1; N12: Mi pensas, ke la Nigra strategio, lasi blankon sieĝi la angulon supran maldekstran, estas malbona. N34: Interesa.

Registraĵo 2; N52: Severa. B53-B73: Mi sentas, ke Blanko friponis savante siajn gravajn du ŝtonojn, B43 kaj B45. B75: Kiel vi esprimos tiun ĉi meton? “Dueleca”, “defianta”, aŭ vi preferus alian vorton? Bonvole respondu al mi.

Registraĵo 3; Mi ne rimarkis difekton de la blanka ŝtonaro. Kiam Nigro ŝtonmetis la 86an meton, mi rezignis. Blanko havas nenian rimedon por savi la 5 ŝtonojn.


Diagramo 1; Montras analizon post la rezigno. Nigro ne malvenkos la kaptkonkuron, eĉ se li ne batalus la alternekaptadon ĉe la triangule markitaj ŝtonoj.

Diagramo 2: Mi pensas, kiam Nigro ŝtonmetis 74an meton (triangule markitan), li devus kapti blankan ŝtonon sur la zenito, per ŝtonmeto sur la punkton de la ŝtono B1 en tiu ĉi diagramo. Mi antaŭvidis tiun ĉi procedon, kaj volus ataki la nigran grupon etenditan de la Supra rando.


Diagramo 3: En partioj oni ne devus diri se..., sed se Blanko ŝtonmetus la 85an meton sur la punkton unuvoje maldekstren, la luktado daŭrus...

(Fino)

Diagramo 2 : Anstataŭ N76



Diagramo 3 : Anstataŭ B85



Okazis Tutjapana Go-konkursoj de gelernantoj

La 27an de decembro 2015 okazis Tutjapana go-konkurso de gelernantoj. Mi vidis ilin en televido.



En la unua parto 10-jara knabo Fukuoka kaj 12-jara knabo Ikeda ludis. Ili havis po 20 minutojn kaj post kiam ili eluzis tiun tempon, ili devis meti ŝtonon en 10 sekundoj. Komence Fukuoka havis avantaĝon, sed fine li tro atakis kaj eraris. Li ploris. Ikeda fariĝis la ĉampiono en la kadro de go-ludantoj de la elementaj lernejoj.



En la dua parto Hajaŝi Rjou kaj Hajaŝi Tomoja (hazarde ili havas saman familian nomon el sama gubernio Saitama) ludis, kaj Tomoja venkis kaj fariĝis la ĉampiono.



La du ludadoj estis pli interesaj ol tiuj de profesiaj go-ludistoj. Mi ne povis forlasi la televidon dum du horoj.

LEE Sedol parolis post la matĉoj kontraŭ Alpha Go

LEE Sedol (Goisto, 9p) post la tria partio kun Alpha Go:



Mi hontemas, ĉar montriĝis mia malsufiĉa kapablo ambaŭ en la enhavo kaj la rezultoj. Do klariĝis, ke estas tre malfacile por mi venki Alpha Go, ĉar mi miskomprenis ĝian kapablon. Vera konkurenco montriĝis en la 2a partio, kie la lud-enhavo fluis laŭ mia intenco, tamen

ofte mi malsukcesis kapti ŝancojn. Tial en la tria partio mi eĉ kun sufiĉe da spertoj sentis subpremon kaj pezon de la tasko. En tia situacio mia kapablo malsufiĉis por venki. Mia malvenko de la tuta matĉo jam estas decidita, ĉar tri partiojn el la kvin mi jam perdis. Tamen tial psikologie mi jam estas trankvila, kaj la 4-a kaj la 5-a partioj pli ĝuste povos montri verajn kapablojn. Mi ne sentis specialan premon pro la matĉloko en Koreio, male eĉ pli komforta mi sentis ĉe mi. Se mi malvenkus 2:0 en la matĉo de homo-kun-homo, mi ne sentus streĉiĝon. Tamen kun Alpha Go en la tute nova sperto mi perdis ŝancon sen kuraĝaj provoj.

* LEE Sedol (Goisto, 9p) post la kvara partio kun Alpha Go:

Por la unua fojo mi ricevis gratulojn okaze de la nur unu foja venko. Mi estas plene ĝoja per la unu venko sekvanta tri malvenkojn. Kun nenio interŝanĝebla valora venko ĝi estas.

Hodiaŭ Alpha Go montris du malfortaĵojn. La unua estas, ke ĝi pli suferas, kiam ĝi prenas vicon de nigro ol blanko. La dua estas, ke kiam ĝi renkontas tute ne imagitan ludmeton kelkfoje perdis racian ludkapablon dum siaj sekvaj kelkaj metoj. La kapablo de Alpha Go

adekvate akordiĝi al tute nesupozeblaj okazoj ne estas sufiĉa. Se mi de antaŭe jam havus multe da informo, mi pli facile ludus. Tamen mia kapablo estas nesufiĉa, la ekvilibro de la informoj (kion oni kritikadas) ne estas problemo, mi pensas.

Kvankam mi havis iom da mensa ŝoko, ĝi ne estas tiel decida, ke mi ne povis daŭrigi la partiojn. Ĉar mi venkis kun blanko, mi preferas venki per nigro en la kvina partio, kaj tiel fari estas pli valora laŭ mia penso. Tial mi petis de la organizanto de la matĉo lasi min kapti nigron en 5-a partio, kaj oni akceptis tion.



La kvara partio: Nigro-Alpha, blanko-LEE Sedol. LEE venkis.

(Responde al la demando, ke Gu Li (ĉina goisto, 9p) taksis blanka-78an meton "dia meto"): Vere en centra spaco povus okazi sukcesaj metoj, sed mi timis malvenkon. Trovinte nur tiun rimedon blanka-78an mi ludis tion, sed ricevis laŭdojn kaj mi embarasiĝas.

(Tradukita de HO [Song](#))

XXIII-a Esperantista KGS-Turniro (6)

Matthias / esgo

Ĉi-foje niaj 6-a ĝis 8-a kjuoj akiris la plej bonajn rezultojn je 4:1: Algiskas, Javaharlal kaj nikopipe. Mi tre kore gratulas! Ne forgesu, ke niaj plej fortaj ludantoj refoje ludis akrajn partiojn pro la handikapŝtonoj.

La fina turnirtabelo de nia XXIII-a turniro:

Ludanto	Grado	Numero:kontraŭulo, +:venko, -:malvenko, ?:ne raportita					Numero de venko
1. Cortex	IID	-2	0				
2. Morikin	IID	+1	-3	-4	+5	-7	2
3. ESPERANTO	1K	+4	+2	-5	-6	-8	2
4. russ	4K	-3	+/	+2/-9	/	-5	2
5. esgo	5K	-8	-7	+3	-2	+4	2
6. Algiskas	6K	+7	+10	+8	+3	?9	4
7. Javaharlal	7K	-6	+5	10	+9	+2	4
8. nikopipe	8K	+5	+9	-6	+10	+3	4
9. dodosan	10K	+10	-8	+4	-7	?6	2
10. HegedusI	10K	-9	-6	-7	-8	+/	1

Kaj la tabelo de la "veraj potencoj"

(3-a kolumno: grado; 4-a: elirpontoj laŭ grado; 5-a: gajnitaj partioj; 6-a: finrezulto)

1. Morikin	IID	21	2	23
2. ESPERANTO	1K	19	2	21
3. russ	4K	16	2	18
4. Algiskas	6K	14	4	18
5. esgo	5K	15	2	17
6. Javaharlal	7K	13	4	17
7. nikopipe	8K	12	4	16
8. dodosan	10K	10	2	12
9. HegedusI	10K	10	1	11

El la KGS 2015

N.Sakurai

Oni prezentas partion lerte luditan inter Morikin (MORI Hitosi el Japanio) kaj Cortex (D-ro Christoph Klawe el Germanio) en la KGS kun koncizaj komentoj. Morikin havas Nigran kaj Cortex blankon.


Dia. 1-a. Per la unua meto okupi la centran punkton (Tengen) estas maniero de Morikin. Mi ne sciis la metmanieron ĝis B-22 ĉe la supremaldekstra parto, ĉu la nova metodo? Nigro celas grandan potencon en la centra maldekstra teritorio ĝis N-39.

Dia. 2-a. Blanko draste senigas la teritorian enhavon de la Nigro en la maldekstra-centra, tamen la ŝtonaro komplete ĉirkaŭite ĝis N-39 devas vivi kun apenaŭ du okuloj kiel ĝis B-6 de Dia. 3-a.


Dia. 3-a kaj Dia. 4-a. Ĉifoje Nigro invadas dekstran blankan flankon rekompence. Ĝis N-29 de Dia. 4-a. Nigro gajnas profiton, rekompence Blanko disigas la nigran teritorion per B-30.

Dia. 5-a. Per N-11, N-17, N-23 kaj N-25 Nigro sukcesis akiri sufiĉe grandan teritorion ĉe supre maldekstre, kio alportis avantaĝon al Nigro en la partio. Ĉu problemoj en la metoj de Blanko estis?

Dia. 6-a. Ĝis N-17 Blanko eraris aŭ faris rezignan formon kredeble? - mi ne povas diveni. Ĉiukaze Nigro gajnis la partion.




Dia. 1-a. 40 metoj (1~40)




Dia. 2-a. 40 metoj (41~80)

Montrite Diagramoj 3-a, 4-a, 5-a, kaj 6-a.


Nigro: Morikin Blanko: Cortex




Dia. 3-a. 20 metoj (81~100)



Dia. 4-a. 30 metoj (101~130)



Dia. 5-a. 30 metoj (131~160)




Dia. 6-a. 17 metoj (161~177)

Go-ekzercaro por komencantoj (11)


N.Sakurai

Kiu meto mortigas la blankan ŝtonaron? Se la blanka ŝtonaro havas du okulojn, la ŝtonaro ne mortas. Kiel do senigi la alian okulon?



Respondo A: (bona)

Per N-1 la blanka ŝtonaro ne povas havi du okulojn kaj mortas.




Respondo B: (Malbona)


Se Nigro metas N-1, Blanko metas B-2 kaj la blanka ŝtonaro vivas kun du okuloj.



La problemo 243-a
Nigro havas meton. Ĉu la nigra povas vivi? Kiel do?



La problemo 244-a
Nigro havas meton. Mortigu la blankan. Ne eble! Ĉu?



La solvo 243-a

La nigra ŝtonaro vivas.

Fig. 1-a. (La solvo) Premi kiel N-1 kaj al B-2 saltpremi kiel N-3 estas bona rimedo. Tio estas kutima metodo al ĉi tia formo. Per alia maniero oni ne povas kapti la blankajn tri ŝtonojn.

Fig. 2-a. (Daŭrigo) Poste se B-4, sekvas N-5, B-6, N-7.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Daŭrigo) Poste al la ligo B-8, sekvas N-9, B-10, N-11.

Fig. 4-a. (Vario) Se B-1 ĉe B-4 de fig. 2-a, sekvas N-2, B-3, N-4, B-5, N-6 kaj la blankaj ses ŝtonoj falas en la lavangon.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

La solvo 244-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) Ĉar la ĉirkaŭanta nigra ŝtonaro estas tre fortika, la aŭdaca rimedo eblas. Nigro, tuŝante kiel N-1, malsupreniras kiel N-3, kaj tiam la tranĉo kaj la transvado fariĝas unu el la du.

Fig. 2-a. (Daŭrigo) Se Blanko baras kiel B-4, sekvas la tranĉo N-5, kaj tiam Blanko nenion povas fari plu pro la sufokiĝo.




fig. 1-a.




fig. 2 a.

Fig. 3-a. (Malsukceso) N-1 malsukcesas. Blanko respondas B-2, kaj Nigro ne plu povas senigi okulojn de la nigra ŝtonaro.

Fig. 4-a. (Malsukceso) Ankaŭ la tuŝmeto N-1 malsukcesas. Blanko tiras kiel B-2, kaj Nigro ne plu povas bari formiĝon de du okuloj al la blanka ŝtonaro.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

2015年度会計報告

桜井 信夫

【収入】

前年度繰越金	373,684円
会費A (26名)	26,000
会費B (5名)	12,500
寄付金	19,000
預金利子	123
合計	431,307円

【支出】

Go-Amiko印刷費	9,600円
同発送費及び通信費	25,400
送金手数料	610
合計	35,610円

差し引き残高 295,697円

差し引き残高は翌年への繰越金となります。

2016年新春囲碁大会

参加者6名×参加費2000円	=12,000円
昼食弁当代	-9,000
賞品代	-3,000
合計	0円

会費納入2015年度A=1,000円(続き)杜あもり、山岸悦子、桜井裕子、平野清亨、梶森介、木下恒、佐野寛、小渕修子、木下真由美、小山武、2015年度会費B=2,500円(続き)松岡耕二

2016年度A:木下恒、佐野寛、森均、堀泰雄、神山征治、桜井信夫、桜井裕子、

2016年度B:秋葉邦弘、松岡耕二、烏田素直、斉木彰(2015-2018)

寄付金 木下恒 3,000円、森均 4,000円 神山征治 7,000円 桜井信夫 7,000円 (会費BはJEGAの貴重な活動資金を含みます)

大島順子さんからは昨年5年分の会費をいただいています。上の報告から漏れてしまい申し訳ありません。

Agadplano de JEGA

Dum la 102a Japana Esperanto-Kongreso ni havis kunsidon kaj decidis jene nian laborplanon:

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro)

Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Laborplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2016.1.10 en la Go-salono de s-ro Sakurai

Maja kunsido : 2016.5.14-15 en Esperanto-Domo de Jacugatake

La 101a UK : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos go-kurson.

La 103a Japana Esperanto-Kongreso: ni havos kunsidon.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

Go-amiko aperos en nia retejo: <http://jega.shisyuu.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA

Japanaj membroj pagu 1000 enojn kiel la jaran kotizon. Se eblas, donacu 1500 enojn pli.

Eksterlandaj abonantoj ricevos la revuon senpage.

*Se ili volas subteni la agadon de EGLI, ili membriĝu al EGLI, pagante la jaran kotizon de 10 eŭroj al UEA-konto de EGLI.

(4) Libro kaj go-tabuloj

Ni havas relative grandan stokon de go-libroj kaj tabuloj.

* "Invito al GO-Ludo" (maldika libro): ni senpage donacos.

* "Fundamento de Taktiko kaj Strategio de GO-Ludo" (dika libro) kun pago.

* Go-tabulo (9x9-linia) kaj ŝtonaroj: ni senpage donacos.

Serio “Raportoj el Japanio”

verkita de HORI Jasuo



“Raportoj el Japanio” (ekde la n-ro 15 ĝis la n-ro 19 de) temas pri la Japana Katastrofo, kiu okazis en marto 2011, inkludante la nuklean akcidenton en Fukuŝima. Tiuj libroj estos por la historio tre gravaj dokumentoj.

- | | | |
|---|----------------------|-------------|
| Raportoj el Japanio 15 (eldonita en 2012) | A5-formato 432 | (elĉerpita) |
| Raportoj el Japanio 16 (eldonita en 2013) | A5-formato 286 paĝoj | 13 eŭroj |
| Raportoj el Japanio 17 (eldonita en 2014) | A5-formato 286 paĝoj | 13 eŭroj |
| Raportoj el Japanio 18 (eldonita en 2015) | A5-formato 268 paĝoj | 13 eŭroj |
| Raportoj el Japanio 19 (eldonita en 2016) | A5-formato 268 paĝoj | 13 eŭroj |

JEGA ハヶ岳囲碁合宿のお知らせ

(Go-kurso en Jacugatake-Esperanto-Domo)

日時： 2016 年 5 月 14 日(土) 14:00 – 5 月 15 日(日) 11:00

Dato: la 14a de majo 2016 (sabato) 14:00 – la 15a de majo (dimanĉo) 11:00

場所： ハヶ岳エスペラント館 (電話 03-3491-1349)

(中央線小淵沢で小海線に乗り換え一つ目の駅甲斐小泉駅下車徒歩 10 分)

Kursejo: Jacugatake-Esperanto-Domo en la gubernio Jamanaŝi

会費： 3000円(食事別)

Kotizo: 3000 enoj (30 eŭroj)

申し込み： メール：horizonto@water.sannet.ne.jp 電話・ファックス:027-253-2524

などで堀泰雄まで、申し込んでください。

Aliĝo: al HORI Jasuo horizonto@water.sannet.ne.jp

中井恒夫さんご逝去

4 月 10 日、中井恒夫さん(東京都世田谷区)がお亡くなりになりました。中井さんは、新年囲碁大会、ハヶ岳での合宿などにはほとんど欠かさずご参加になっていました。ご冥福をお祈りいたします。弔文は次号に掲載します。

S-ro Nakai Cuneo (Tokio) forpasis la 10an de aprilo. Ni deziras lian pacan dormon en la paradizo.

○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会

Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会

UEA-konto: egli-f

ホームページ: <http://jega.shisyous.com/jega/index.html>

連絡先: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio

Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大利根町2-13-3 堀泰雄方

メール:horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524